

**Frederiko Engelso**  
**La libro de revelacio**  
**(La apokalipso de Johano)**



**Frederiko Engelso**

**La libro de revelacio  
(La apokalipso de Johano)**

**Monda Asembleo Socia (MAS)**

Frederiko Engelso

La libro de revelacio (La apokalipso de Johano)

Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2014

ISBN 978-2-918300-97-7

Laŭ: "Progress", Vol. II, Londono 1883, p. 112-116. El la angla tradukita al la germana.

Elgermanigita el la enretigita versio (enretigita la 20-an de marto 1999) de Karl Marx/ Friedrich Engels - Werke. (Karl) Dietz Verlag, Berlino. Volumo 21, 5-a eldono 1975, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1962, Berlino/GDR. p. 9-15.

Tiun ĉi libreton la tradukinto dediĉas al

Gerardo Hernández Nordelo,  
Ramón Labañino Salazar,  
Antonio Guerrero Rodríguez,  
Fernando González Llort kaj  
René González Schwerert<sup>1</sup>

- 
- 1 *La Kvin Kubanoj* – aŭ *la Kuba Kvinopo* –, kiuj estis sin enŝovintaj en la teroristajn grupojn de Miamo, Usono, por neŭtraliigi ilin. La Kvin sukcesis malhelpi cent sepdek atencojn kontraŭ Kubo per tio, ke ili ĝustatempe alarmis la instancojn en Havano. La kuba registaro informis tiam la usonajn instancojn kaj, en junio 1998, delegacio de la FBI vojaĝis al Kubo, kie ĝi ricevis kompletan dokumentaron pri la agadoj de la ekstremistoj de Miamo.

Post konatiĝi kun la informoj kaj la nerefuteblaj pruvoj pri la kontraŭleĝaj kaj danĝeraj agadoj de tiuj grupoj, la FBI, anstataŭ agi kontraŭ tiuj krimuloj, arestigis la kvin informantojn, kiuj, riske de siaj vivoj, estis barintaj tiujn teroraĵojn. Ili estis en Miamo kondamnitaj al longaj jaroj de malliberejo, ekz-e Gerardo al pli ol duoble vivolonga malliberejo.

Pri tiu justicskandalo vidu en Esperanto Salim Lamrani (komp.): *La terorismo de Usono kontraŭ Kubo; La Kuba Kvinopo*. (librofina librolisto n-ro 19)

Kp ankaŭ Jean-Guy Allard: *Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko* (librofina librolisto n-ro 94)

# Enhavo

Frederiko Engelso: La libro de revelacio (La apokalipso).....	7
Vikipedio pri apokalipso.....	20
La ĝenro apokalipso.....	20
Antikveco.....	20
Judismo.....	21
Prakristanismo.....	22
Bazaj ideoj de la apokalipsa teologio.....	23
Bildaj prezentoj.....	24
Postparolo de la tradukinto.....	27
Mallongigoj.....	27
Sigloj.....	27



# Frederiko Engelso: La libro de revelacio (La apokalipso)

La historia kaj lingva kritiko de la Biblio, la esplorado de la aĝo, de la origino kaj de la historia valoro de la diversaj skribaĵoj, kiuj konsistigas la Malnovan kaj la Novan Testamentojn, estas scienco konata en tiu ĉi lando<sup>1</sup> de preskaŭ neniu krom kelkaj liberpensemaj teologoj, kiuj klopodas por teni ĝin kiom eble plej sekreta.

Tiu scienco estas preskaŭ ekskluzive germana. Krome, la malmulto kiu transiris la limojn de Germanio, vere ne montriĝis esti ĝia plej bona parto; ĝi estas tiu liberpensa kritiko, kiu fanfaronas esti senantaŭjuĝa, ĝisfundema kaj samtempe kristana. La libroj ne estas vere revelacioj de la sankta spirito, sed estas revelacioj de la dieco fare de la sankta spirito de la homeco ktp. Tiel la reprezentantoj de la Tubinga Skolo (Baur<sup>2</sup>, Gfrörer<sup>3</sup> ktp) en Nederlando kaj Svislando estas same ŝatataj kiel en Anglio; sed se oni volas iom iri pli antaŭen, oni sekvas Strauß-on<sup>4</sup>. La sama indulga, sed komplete senhistoria spirito regas la faman Ernest Renan<sup>5</sup>, kiu estas nur mizera plagiatanto de la germanaj kritikistoj. El ĉiuj liaj verkoj apartenas al li nenio ol la estetika sentimentaleco de la penetranta penso kaj la malprofunda lingvaĵo per kiu ĉio estas vestita.

Tamen ion bonan Ernest Renan ja diris:

„Se vi volas havi ideon pri tio, kio estis la unuaj kristanaj komunumoj,

---

1 Temas pri Anglio. -vl

2 Ferdinand Christian Baur [férđinant krístian báŭr] (1792 – 1860) historiisto pri protestantaj ekzlezio kaj dogmaro. -vl

3 August Friedrich Gfrörer [áŭgust frídriĥ kférer] (1803 – 1861) estis historiisto kaj deputito de la Frankfurta Nacia Asembleo. Li studis evangelian teologion en Tubingo kaj fariĝis 1846 profesoro pri historio ĉe la universitato de Friburgo en Brisgovo. De 1848 ĝis 1849 li estis delegito de la Frankfurta Nacia Asembleo. En la jaro 1853 li konvertiĝis al la katolikismo. Liaj religiaj kaj politikaj verkoj estas plej ofte publikigitaj sub la pseŭdonomo Ernst Freymund. (Laŭ Vikipedio.) -vl

4 Ĉu David Friedrich Strauß [dávit frídriĥ stráŭs] (1808 – 1874), germana evangelia teologo? -vl

5 Ernest Renan [ernést renán], 1823-1892, franca verkisto kaj historiisto. Li verkis Historion de la originoj de la kristanismo (1863-1881), kies unua volumo „Vivo de Jesuo” furoris. -pl



## Frederiko Engelso: La libro de revelacioj (La apokalipso)

tiam ne komparu ilin kun la ekleziaj komunumoj nuntempaj; ili similis pli al lokaj sektoj de la Internacia Laborista Asocio.”

Kaj tio ĝustas. La kristanismo kaptis la amasojn tute same kiel la moderna socialismo faras tion, en la formo de tre diversaj sektoj kaj eĉ pli per kontraŭdiraj individuaj opinioj – kelkaj pli klaraj, kelkaj pli konfuzaj, ĉe kio la lastaj estis ege plimultaj –, sed ĉiuj estis malamikaj al la reganta sistemo, al „la ekzistantaj potencoj”.

Ni prenu ekz-e nian libron de revelacio, pri kiu ni vidos, ke ĝi, anstataŭ esti la plej obskura kaj plej mistera, estas la plej simpla kaj plej klara libro de la tuta Nova Testamento. En la momento ni devas peti la leganton kredi kion ni iom post iom pruvos: ke ĝi estis verkita en la jaro 68 aŭ en januaro 69 d.n.e. [de nia erao] kaj ke ĝi estas pro tio ne nur la sola libro de la Nova Testamento, pri kiu la dato estas vere certa, sed ankaŭ la plej malnova libro. Kia la kristanismo en la jaro 68 aspektis, tion ni povas vidi ĉi tie kvazaŭ en spugulo.

Unue, sektoj kaj ĉiam denove sektoj. En la mesaĝo al la sep eklezioj de Azio ĝi mencias almenaŭ tri sektojn, pri kiuj ni alie scias nenion pli: la nikolajanojn, la bileamanojn kaj la adeptojn de virino, simboligita ĉi tie per la nomo Jesabel. Pri ĉiuj tri ĝi asertas, ke ili permesas al siaj adeptoj manĝi el la aĵoj oferataj al la dioj, kaj ke ili amas malĉastecon. Estas stranga fakto, ke kun ĉia granda revolucia movado la demando de „libera amo” aktualiĝas: ĉe parto de la homoj kiel revolucia progreso, kiel deĵeto de jam ne necesaj malnovaj tradiciaj katenoj, ĉe aliaj kiel bonvena instruo, kiu komforte kovras ĉiajn senbridaĵojn inter viro kaj virino. Ŝajnas, ke la lastaj, nome la filiŝtoj, tie baldaŭ ekdominis; ĉar la „malĉastecon” estas ĉiam rilatigata kun manĝo de „idol-oferoj”, kio estis strikte malpermesata al judoj kaj kristanoj, sed kion rifuzi povis esti kelkfoje danĝera aŭ almenaŭ malagraba. Tio montras evidente, ke la tie menciataj adeptoj de libera amo ĝenerale strebis esti ĉies amiko kaj ke ili havis ĉion alian ol emon fariĝi martiroj.

La kristanismo estis kreita de la amasoj, kiel ĉiu alia granda revolucia movado. Ĝi estiĝis en Palestino en maniero al ni komplete nekonata, en epoko, kiam novaj sektoj, novaj religioj, novaj profetoj aperis centope. Fakte temas pri ordinara fenomeno, kiu sponte estiĝis el la reciprokaj frotiĝoj de la pli progresemaĵoj el tiuj sektoj kaj kiu poste fariĝis instruo pro la

## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

aldoniĝo de teoremoj de la aleksandria Filono<sup>6</sup> kaj poste per fortaj stoikaj enfiltriĝoj. Se ni povas efektive nomi Filonon la spirita patro de la kristanismo, tiam Seneko<sup>7</sup> estis ĝia onklo. Tutaj paragrafoj de la Nova Testamento ŝajnas esti preskaŭ laŭvorte kopiitaj el liaj verkoj: aliflanke oni povas trovi paragrafojn en la satiroj de Persio<sup>8</sup>, kiuj ŝajnas esti prenitaj el la tiam ne-skribita Nova Testamento. El ĉiuj ĉi la doktrinon koncernantaj elementoj neniu troviĝas en nia Libro de Revelacio. Ĉi tie temas pri la kristanismo en la plej praa formo, en kiu ĝi estis por ni konservita. Tie ekzistas nur unu antaŭranga dogma punkto: ke la kredantoj estas savitaj pro la ofero de Kristo. Sed kiel kaj kial, tio absolute ne klarigeblas. Tie estas nenio ol la malnova juda kaj pagana imago, ke Dio aŭ la dioj estas repacigendaj per oferoj, transformita en la specife kristanan imagon (kiun la kristanismo efektive faris ĝenerala religio), ke la morto de Kristo estas la granda ofero unu fojon por ĉiam sufiĉa.

Nenia spuro de la prapeko<sup>9</sup>. Nenio pri la triunuo<sup>10</sup>. Jesuo estas „la ŝafido”, sed subordigita al Dio. Fakte, en la paragrafo 15,3 li estas metita en la

---

6 Filono de Aleksandrio (greke Φίλων *Phílōn*, latinigite *Philo Alexandrinus* aŭ *Philo Iudaus*; 15/10 a.n.e. – post 40 d.n.e) estis influhava juda filozofo kaj teologo. Li estas la plej konata pensisto de la helenisma judismo.

7 Seneko (latine: Lucius Annaeus Seneca, nomata Seneko la pli juna (proks. en la jaro 1 d.n.e. – 65)), estis roma filozofo, dramisto, natursciencisto, ŝtatestro kaj kiel stoikisto unu el la plej legataj verkistoj de sia tempo. Liaj paroladoj, kiuj famigis lin, perdiĝis. Ekde la jaro 49 li estis la ĉefa edukisto de la posta imperiestro Nerono. Por prepari tiun al liaj estontaj taskoj, li verkis memuaron pri la demando, kial por reganto estas saĝe regi per mildeco (*de clementia*). Fine la imperiestro kulpigis lin je partopreno en konspiro kaj ordonis al li memmortigi sin. Seneko senhezite plenumis tiun ordonon. (Laŭ Vikipedio) -vl

8 Persio (latine: Aulus Persius Flaccus, 34 – 62), ofte nomata nur mallonge Persio, estis roma poeto de etruska deveno. En siaj verkoj, poemoj kaj satiroj li instruis la stoikan vivmanieron kaj kritikis la siatempajn misojn. Liaj verkoj estis ĝis en la mezepoko popularaj. Per sia *habitare secum*, kiu estas unuafaje menciita ĉe li, Persio stampis ankaŭ la kristanan spiritecon. (Laŭ Vikipedio) -vl

9 Laŭ la kristana kredo, la homoj estas denaske ŝarĝitaj de la peko de la unuaj homoj (Adamo kaj Evo). Ties peko – la prapeko – konsistis en manĝo de malpermesita frukto, kiu donas la konscion pri la bono kaj la malbono. -vl

10 Laŭ la kristana kredo, Dio ekzistas en tri formoj: la Dio patro, ties filo Jesuo kaj la Sankta Spirito. -vl

## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

saman rangon kun Moseo.<sup>11</sup> Anstataŭ la unu sankta spirito ekzistas „la sep spiritoj de Dio” (3,1 kaj 4,5). La murditaj sanktuloj (la martiroj) alvokas Dion al venĝo:

„kaj ili kriis per granda voĉo, dirante: Ĝis kiam, ho Estro, la sankta kaj vera, Vi ne juĝas kaj ne venĝas nian sangon al la loĝantoj sur la tero?” (6,10)

Jen montriĝo de sento, kiu poste estis zorge forstrekita el la moralkodekso de la kristanismo, sed kiu en la praktiko estis des pli forte aplikata, ekde kiam la kristanoj venkis la paganojn. Kompreneble la kristanismo estas nur sekto de la judismo. Tiel en la mesaĝo al la sep komunumoj:

„Mi scias vian aflikton kaj vian malriĉecon (vi tamen estas riĉa), kaj la blasfemon de tiuj, kiuj nomas sin judoj” (ne kristanoj), „kaj estas ne tiaj, sed sinagogo de Satano” (2,9);

kaj ree:

„Jen mi donas el la sinagogo de Satano, kiuj sin nomas Judoj, kaj estas ne tiaj, sed mensogas [...]” (3,9)

Nia aŭtoro en la jaro 69 d.n.e. havis do absolute nenian imagon pri tio, ke li reprezentis novan fazon de la religia evoluo, destinita fariĝi unu el la plej esencaj elementoj de la revolucio. Pro tio, kiam la sanktuloj aperas antaŭ la trono de Dio, ili estas unue 144.000 judoj, 12.000 el ĉiu de la dek du triboj, kaj nur post ili la paganoj estas allasataj, kiuj estis aliĝintaj al tiu nova fazo de la judismo.

Tia aspektis la kristanismo en la jaro 68, kia ĝi estas priskribata en la plej malnova kaj sola libro de la Nova Testamento, kies aŭtenteco ne pridubblas. Kiu estis la aŭtoro, tion ni ne scias. Li nomas sin Johano. Li eĉ ne pretendas esti la „apostolo” Johano, ĉar la fundamentoj de la „nova Jerusalemo” enhavas la „nomojn de la dek du apostoloj de la Ŝafido” (21,14). Do, tiuj estis jam mortintaj, kiam li verkis la libron. Ke li estis judo, tio klare evidentas el la sufiĉe multaj hebreismoj en lia greka lingvo, kiu je malbona

---

11 „Kaj ili kantis la kanton de Moseo, la servanton de Dio, kaj la kanton de la Ŝafido, dirante: Grandaj kaj mirindaj estas Viaj faroj, ho Dio, la Sinjoro, la Plejpotenca; justaj kaj veraj estas Viaj vojoj, ho Reĝo de la nacioj.” (p. 1367) -v1

## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

gramatiko eĉ multe superas la ceterajn librojn de la Nova Testamento. La fakto, ke la tiel nomata Evangelio de Johano, la leteroj de Johano kaj tiu ĉi libro havas almenaŭ tri diversajn aŭtorojn, estas senambigue pruvita de ilia lingvo, se ne jam de la en ili entenataj komplete kontraŭdiraj doktrinoj.

La apokalipsaj vizioj, kiuj konsistigas preskaŭ la tutan libron, estas en la plej multaj kazoj laŭvorte elprenitaj el la klasikaj profetoj de la Malnova Testamento kaj de ties postaj imitantoj, komence el la libro de Danielo (proksimume 160 a.n.e., kiu profetis aferojn, kiuj okazis jarcentojn antaŭe) kaj fine el la „Libro de Ĥanoĥ”<sup>12</sup>, apokrifa ellaboraĵo en greka lingvo, verkita nelonge antaŭ nia erao. La origina elpenŝaĵo, eĉ la grupado de la plagiatitaj vizioj, estas ekstreme mizera. La profesoro Ferdinand Benary, al kies serio de prelegoj ĉe la Berlina Universitato en la jaro 1841 mi dankas la sekvon, pravis per indiko de ĉapitro kaj verso, de kie nia aŭtoro elprenis ĉiun unuopan el siaj tiel nomataj vizioj. Pro tio estas senutila sekvi nian „Johanon” en ĉiuj liaj strangaj kapricoj. Anstataŭ tio, ni prefere venu tuj al la punkto, kiu malkovras la sekreton de tiu ĉiukaze kurioza libro.

En kompleta kontraŭeco al ĉiuj ĝiaj ortodoksaj komentistoj, kiuj ĉiuj atendas, ke ĝiaj profetaĵoj ankoraŭ okazos, post pli ol 1.800 jaroj, „Johano” neniam ĉesas diri:

„La tempo estas proksima, ĉio ĉi okazos tre baldaŭ.”

Kaj tio validas aparte por la krizo, kiun li antaŭdiras kaj kiun vidi li evidente atendas.

---

12 Laŭ la Malnova Testamento (Genezo 5,18-24) Ĥanoĥ estas la unua filo de Jared kaj do posteulo de Set. Lia patro estis 162-jaraĝa kiam li generis lin. Li mem generis en la aĝo de 65 jaroj Metusalemon (Metuŝelaĥon). Poste li vivis ankoraŭ 300 jarojn kaj generis multajn pliajn gefilojn. Poste, la teksto diras: „Kaj Ĥanoĥ iris kun Dio; kaj li malaperis, ĉar Dio lin prenis.” (Genezo 5,24)

En la Nova Testamento (en la Epistoloj al la hebreoj 11,5) la teksto emfazas, ke „per la fido Ĥanoĥ estis transportita, por ne vidi morton; kaj li ne estis trovata, ĉar Dio lin transportis; ĉar antaŭ lia transporto estis atestite pri li, ke li plaĉis al Dio.” Ĉi tie montriĝas la influo de la paŭla teologio kun ĝia pravigo de la kredanto per lia kredo, ne per liaj faroj. (Laŭ Vikipedio) -vl

## Frederiko Engelso: La libro de revelacioj (La apokalipso)

Tiu krizo estas la granda decida batalo inter Dio kaj la „Antikristo”, kiel aliaj nomis lin. La decidaj ĉapitroj estas la ĉapitroj 13 kaj 17. Ni preterlasu ĉiujn superflujajn ornamaĵojn: „Johano” vidas beston paŝi el la maro, kiu havas sep kapojn kaj dek kornojn (la kornoj tute ne interesas nin).

„Kaj mi vidis unu el ĝiaj kapoj, kvazaŭ ĝi estus morte vunda; kaj ĝia morta vundo saniĝis.”

Tiu besto devos por 42 monatoj (duono de la sanktaj sep jaroj) havi povon super la Tero kontraŭ Dio kaj la Ŝafido, kaj ĉiuj homoj estos dum tiu tempo devigataj porti la signon de tiu besto aŭ la nombron de ĝia nomo ĉe la dekstra mano aŭ ĉe la frunto.

„Ĉi tie estas saĝeco. Kiu havas prudenton, tiu kalkulu la numeron de la besto; ĉar ĝi estas la numero de homo; kaj ĝia numero estas sescent sesdek ses.” (13,18)

En la dua jarcento Ireneo<sup>13</sup> daŭre sciis, ke per la vundita kaj resanigita

---

13 *Sankta Ireneo* (125-202) (latine, *Irenaeus*) estis la dua episkopo de Lugdunum (la nuna Liono, Francio), unu el la Patroj de la Eklezio kaj la plej grava teologo de la kristanismo en la 2-a jarcento. Li batalis kontraŭ la herezo de gnostikismo, precipe en lia libro *Kontraŭ Herezoj* (latine, *Adversus haereses*). En lia libro, li klarigis la doktrinojn de gnostikismo kaj montris, ke tiuj kontraŭdiris la instruojn de la Biblio kaj de la apostoloj. Ĝis la 20-a jarcento, kiam gnostikaj skriboj estis trovitaj en la dezerto de Egiptio, Ireneo estis nia ĉefa fonto pri la doktrinoj de gnostikismo. Tamen la eltrovitaj skriboj montris, ke Ireneo skribis pri gnostikismo tre precize.

En *Pruvo de la apostola predikado* li priskribas sintezon de katolika doktrino ĉe la fino de la 2-a jarcento. La nura konata versio de la verko estis eltrovita en 1904 en la aramea lingvo. La originalo estis en la greka lingvo.

En lia ĉefa libro, *Kontraŭ Herezoj*, Ireneo montris, ke la dio de la juda Biblio kaj la dio de la kristanaj apostoloj estis la unu kaj sama dio – kontraŭ la doktrino de Marciono kaj aliaj gnostikuloj. Li ankaŭ argumentis, ke Jesuo Kristo estis karne reala. Ireneo argumentis kontraŭ herezo per:

- logiko
- apostola tradicio kaj posteuleco
- la Biblio
- kredo en la releviĝo de Jesuo

Ireneo helpis starigi la doktrinon de apostola posteuleco: laŭ la doktrino, nur la episkopoj, kiuj sekvas la apostolojn de Jesuo Kristo, institucie kaj senrompe,

## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

kapo oni celis la imperiestron Nerono. Nerono estis la unua granda persekutisto de la kristanoj. Ĉe lia morto disvastiĝis la onidiro, precipe en Aĥajo<sup>14</sup> kaj Azio, ke li ne estas morta, sed nur vundita kaj ke li iun tagon reaperos kaj teruros la tutan mondon (Tacito, Histo. II,8). Ireneo samtempe konis alian tre malnovan interpreton, laŭ kiu la nomo donis la nombron 616 anstataŭ 666.

En la ĉapitro 17 la sepkapa besto reaperas, ĉi-foje rajdata de la bone konata skarlate ruĝa s-ino, kies plaĉan priskribon la leganto povas mem legi en tiu libro.<sup>15</sup> Anĝelo tie klarigas al tiu Johano:

---

estas fidindaj instruantoj de la kristana vero. Post du mil jaroj la doktrino ankoraŭ estas tenata de la katolikismo kaj ortodoksismo, sed ne de la protestantismo (kiu anstataŭe instruas la doktrinon de *sola scriptura*).

*Kontraŭ Herezoj* estis verkita en la greka, sed la sola tuta version estas en laŭvorta latina traduko. Eroj ankaŭ ekzistas en la greka, siria kaj armena.

Ireneo estis greko kiu devenis de Smirno en Anatolio (la nuna Izmir, Turkio) kaj estis disĉiplo de Sankta Polikarpo de Smirno, la tiea episkopo, kiu, laŭvice, konis Sanktan Johanon la Evangeliiston kaj aliajn apostolojn.

Ireneo floris je la fino de la 2-a jarcento. Li iris al Romo en la jaro 177 por kunveni pri la herezo montanismo. Kiam li revenis, li fariĝis la episkopo de Lugduno en 178, post kiam la unua episkopo, Sankta Pothino, estis martirita dum la persekutado sub la imperiestro Markaŭrelio.

Ireneo verkis en la greka, sed liaj verkoj nun ekzistas nur en traduko en la latina kaj la armena kaj per citaĵoj.

(Laŭ Vikipedio) -vl

14 Regiono de la antikva Grekujo en la nordo de la duoninsulo Peloponezo. -vl

15 Ĉar ne ĉiuj samideanoj disponas pri la E-a Biblio, ni citu ĉi tie la 17-an ĉapitron: „Kaj unu el la sep anĝeloj, havantaj la sep pelvojn, venis kaj parolis kun mi, dirante: Venu ĉi tien, mi montros al vi la juĝon de la granda malĉastistino, kiu sidas sur multaj akvoj; kun kiu la reĝoj de la tero malĉastis, kaj la loĝantoj sur la tero ebriiĝis per la vino de ŝia malĉasteco. Kaj li forportis min en la Spirito en dezerton; kaj mi vidis virinon, sidantan sur skarлата besto, plena de nomoj de blasfemo, havanta sep kapojn kaj dek kornojn. Kaj la virino estis vestita per purpuro kaj skarlato, kaj ornamita per oro kaj altvaloraj ŝtonoj kaj perloj, kaj havis en sia mano oran pokalon, plenan de abomenindaĵoj kaj la malpuraĵoj de ŝia malĉasteco, kaj sur sia frunto nomon skribitan: MISTERO, BABEL LA GRANDA, LA PATRINO DE LA MALĈASTISTINO KAJ DE LA ABOMENINDAĴOJ DE LA TERO.

Kaj mi vidis la virinon ebria de la sango de la sanktuloj, kaj de la sango de la

## Frederiko Engelso: La libro de revelacioj (La apokalipso)

„La besto, kiun vi vidis, ekzistis, sed ne ekzistas, kaj venos supren el la abismo kaj iros en pereon. [...] Ĉi tie estas la signifo, kiu havas saĝecon: la sep kapoj estas sep montoj, sur kiuj sidas la virino; kaj ili estas sep reĝoj; *la kvin jam falis, la unu estas, la alia ankoraŭ ne venis*; kaj kiam li venos, li devos resti kelkan tempon. Kaj la besto, kiu ekzistis kaj ne ekzistas, *estas ankaŭ oka, kaj estas el la sep*; [...] Kaj la virino, kiun vi vidis, estas la granda urbo, kiu havas reĝecon super la reĝoj de la tero.”

Ĉi tie ni do havas du klarajn indikojn: 1. La skarlatruĝa sinjorino estas Romo, la granda urbo, kiu regas super la reĝoj de la mondo; 2. en la tempo, en kiu la libro estas verkata, regas la sesa roma imperiestro; post li venos alia, kiu regas mallongan tempon, kaj poste okazos la reveno de tiu, kiu „estas el la sep”, kiu estis vundita, sed resanigita, kaj kies nomo estas entenata en la mistera nombro, kaj pri kiu Ireneo ankoraŭ sciis, ke li estis Nerono.

---

martiroj de Jesuo. Kaj vidinte ŝin, mi miris per granda miro.

Kaj la anĝelo diris al mi: Kial vi miris? mi diros al vi la misteron de la virino, kaj de la besto, kiu portas ŝin kaj kiu havas la sep kapojn kaj la dek kornojn. La besto, kiun vi vidis, ekzistis, sed ne ekzistas, kaj venos supren el la abismo kaj iros en pereon. Kaj la loĝantoj sur la tero, kies nomoj ne estas skribitaj en la libro de vivo jam de la fondo de la mondo, miros, kiam ili vidos la beston, ke ĝi ekzistis kaj ne ekzistas, sed venos.

Ĉi tie estas la signifo, kiu havas saĝecon: la sep kapoj estas sep montoj, sur kiuj sidas la virino; kaj ili estas sep reĝoj; la kvin jam falis, la unu estas, la alia ankoraŭ ne venis; kaj kiam li venos, li devos resti kelkan tempon. Kaj la besto, kiu ekzistis kaj ne ekzistas, estas ankaŭ oka, kaj estas el la sep; kaj ĝi iras en pereon. Kaj la dek kornoj, kiujn vi vidis, estas dek reĝoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis regnon; sed ili ricevas aŭtoritaton kiel reĝoj, kun la besto, por unu horo. Tiuj havas unu intencon, kaj ili donas sian potencon kaj aŭtoritaton al la besto. Tiuj militos kontraŭ la Ŝafido, kaj la Ŝafido venkos ilin, ĉar li estas Sinjoro de sinjoroj, kaj Reĝo de reĝoj; kaj venkos tiuj, kiuj estas kun li, vokitaj kaj elektitaj kaj fidelaj.

Kaj li diris al mi: La akvoj, kiujn vi vidis, kie sidas la malĉastistino, estas popoloj kaj homamasoj kaj nacioj kaj lingvoj. Kaj la dek kornoj, kiujn vi vidis, kaj la besto, malamos la malĉastistinon, kaj faros ŝin izolita kaj nuda, kaj manĝos ŝian karnon, kaj forbruligos ŝin per fajro. Ĉar Dio enmetis en ilian koron efektiviĝi Lian intencon, kaj efektiviĝi unu intencon, kaj doni sian regnon al la besto, ĝis la vortoj de Dio plenumiĝos. Kaj la virino, kiun vi vidis, estas la granda urbo, kiu havas reĝecon super la reĝoj de la tero.” (p. 1368s.) -v1

## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

Se ni komencas ĉe Aŭgusto<sup>16</sup>, tiam ni havas Aŭguston, Tiberion<sup>17</sup>, Kaligulon<sup>18</sup>, Klaŭdion<sup>19</sup> kaj Nerono kiel kvinan. La sesa estas Galbo<sup>20</sup>, kies surtroniĝo estis la signalo por ribelo de la legioj, speciale en Gaŭlujo, gvidata de Otho, posteulo de Galbo. Laŭ tio, nia libro devas esti verkata sub Galbo, kiu regis de la 9-a de junio 68 ĝis la 15-a de januaro 69. Ĝi antaŭdiras la revenon de Nerono kiel tuj okazontan.

Sed nun pri la decida pruvo – la nombro. Ankaŭ tiu estis malkovrita de

---

16 *Gajo Julio Cezaro Aŭgusto* aŭ simple *Aŭgusto* (naskiĝis la 23-an de septembro 63 a.n.e., mortis la 19-an de aŭgusto 14 d.n.e; latine *Gaius Iulius Caesar Augustus*), estis la unua imperiestro de la Roma imperio, kvankam li nomis sin nur la „Unua Civitano” (*princeps*), kaj la „Patro de la Patrujo” (*pater patriae*). Antaŭ 44 a.n.e. oni nomis lin Oktavio (*Gaius Octavius Thurinus*), inter 44 - 27 a.n.e., Oktaviano (*Gaius Iulius Caesar Octavianus*), kaj je 27 a.n.e., li akiris la nomon Aŭgusto (*Augustus*). Li partoprenis en la dua triopo (dua triviraro) kaj estis prave kaj heredonto de Julio Cezaro. Kiel triumviro kaj poste kiel imperiestro, Aŭgusto regis la Roman Imperion dum 57 jaroj, de -43 ĝis 14. Li konsideris sin nedenskata membro de la historia romia familiaro *gens iulia*, pro tio ke li estis adoptita fare de Julio Cezaro, kaj krome konsideris sin ankaŭ nedenskata ano de la same patricia familiaro *gens claudia*, pro tio ke lia tria edzino *Livia Drusilla* estis el tiu familio: per tio do li laŭ sia memkompreno duoble estis romia nobelo.

Post la murdo de Julio, Oktavio kune kun Antoni venkis Markon Bruton kaj la respublikanojn en la Batalo de Filipio en -42. Oktavio estis malsana dum la batalo, do Antonio estis la vera venkinto. Post Filipio, Oktavio kaj Antonio kaj Marko Lepido dividis Romion inter si kaj formis la duan triviropon. Sed poste Oktavio venkis Lepidon kaj, en la Batalo de Aktio je la 2-a de septembro -31, li venkis Antonion mem. Antonio klare estis la pli bona generalo, sed lia pasia amoro por Kleopatra nubigis lian juĝon.

Post la venko de Antonio, neniu povis stari kontraŭ Oktavio. Do en -27, la Senato donis al li la nomon Aŭgusto (latine, *Augustus*, „altigita”) kaj donis al li la potencon de imperiestro.

La Respubliko kaj ties libereco estis delonge mortintaj – ili efektive mortis sur la kampo de Filipio –, sed cent jaroj da militoj, internaj kaj eksteraj, estis anstataŭigitaj de paco, bona regado, bona mono, bonaj vojoj, libera komerco kaj poŝto, kiu alvenas. La longa romia paco komenciĝis ... (Laŭ Vikipedio) -vl

17 Tiberio Julio Cezaro Aŭgusto, denaske nomita Tiberio Klaŭdio Nerono (en la latina: *Tiberius Claudius Nero*; naskiĝis la 16-an de novembro de la jaro 42



## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

Ferdinand Benary kaj de tiam neniam refutita de la scienca mondo.

Proksimume tricent jarojn antaŭ nia erao la judoj komencis uzi siajn literojn kiel simbolojn de nombroj. La spekulaciaj rabenoj vidis en tio metodon por mistika interpreto aŭ kabalo. Sekretaj vortoj estis esprimitaj per la nombro, kiu rezultis el la adicio de la numeraj valoroj de la literoj entenataj en ili. Tiun novan sciencon ili nomis *gematriah*, geometrio. Ĝuste tiun sciencon uzas ĉi tie nia „Johano”. Ni volas pruvi, 1-e, ke la nombro

---

a.n.e. kaj mortis la 16-an de marto 37 d.n.e. Li estis romia imperiestro kiu regis ekde la 18-a de septembro de la jaro 14 ĝis sia morto, la 16-an de marto 37. Li estis la dua roma imperiestro post la morto de Cezaro Aŭgusto. (Laŭ Vikipedio) -vl

18 Kaligulo, latine: *Gaius Caesar Germanicus*, naskiĝis la 31-an de aŭgusto 12, mortis la 24-an de januaro 41, estis roma imperiestro de 37 ĝis 41. Li ŝajne freneziĝis, ekzemple li nomis sian ĉevalon Konsulo, li diris „mi volus, ke la tuta romia popolo havu unu kapon, ke mi povus strangoli ĝin tute en unu fojo”. Li finfine estis murdita. (Laŭ Vikipedio) -vl

19 Klaŭdio, latine: *Tiberius Claudius Nero Caesar Drusus*, originale: *Tiberius Claudius Drusus Nero Germanicus*, naskiĝis la 1-an de aŭgusto -10 en *Lugdunum*, la nuna Liono, mortis la 13-an de oktobro 54; estis roma imperiestro de 41 ĝis 54.

Klaŭdio per milita forto disbatis la kvereladojn inter judoj kaj aliaj loĝantoj de Aleksandrio kaj li donis plurajn privilegiojn al la tieaj judoj por preventi pliajn problemojn. Li taskis Agripion regi por Romo Judeon kaj Samarion; post lia morto, en 44 a.n.e., la lando denove fariĝis romia provinco.

En multaj regionoj Klaŭdio tre lerte sciis fari pacon (pere de konkero, kutime: Maŭretanio fariĝis provinco en 42 a.n.e.) aŭ li regigis nome de Romo talentulojn: ekzemple Mitridaton en Armenio. Li ankaŭ konstruigis la havenojn de Ostio.

Politike li estis malforta kaj fine estis venenita de sia edzino por certigi la povon al Nero, sed li estis unu inter la plej bonaj kaj saĝaj mastrumantoj de la roma imperio. Ĉar li ne havis bonan rilaton al la senato, li apogis sin sur ege faksciaj liberigitoj, kiuj oficis kvazaŭ ministroj por li: Narciso (*ab epistulis*), Palado (*a rationibus*), Kalisto (*a libellis*), Polibio (*a studiis*) ktp.

Post lia morto, lia antaŭa ministro la filozofo Seneko verkis satiron pri li: *La Apokolokintozo de l' Dia klaŭdio* (aperis ĉe VoKo en Esperanto). (Laŭ Vikipedio) -vl

20 Galbo, latine *Servius Sulpicius Galba* estis romia nobelo, kiu naskiĝis en la jaro

## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

entenas la nomon de viro kaj ke tiu viro estas Nero, kaj 2-e, ke la solvo validas por la interpreto 666 kiel ankaŭ same por tiu de 616 . Ni prenu la hebreajn literojn kaj iliajn valorojn:

(nun)	n	= 50
(resch)	r	= 200
(waw) por	o	= 6
(nun)	n	= 50
(koph)	k [q]	= 100
(samech)	s	= 60
(resch)	r	= 200

*Neron Kesar*, la imperiestro *Neron*, greke *Neron Kaisar*. Sed se ni nun, anstataŭ uzi la grekan skribmanieron, transigas la latinan *Nero Caesar* en hebreajn literojn, tiam la *nun* malaperas fine de *Neron* kaj per tio la valoro de 50. Tio montras la alian malnovan interpreton, nome 616, kaj per tio la pruvo estas tiom kompleta kiom oni povas nur deziri.<sup>21</sup>

Do, la enhavo de tiu mistera libro kuŝas nun tute klare antaŭ ni. „Johano” antaŭdiras la revenon de Nerono proksimume por la jaro 70 kaj lian teruran regadon, kiu daŭros 42 monatojn aŭ 1.260 tagojn. Post tiu tempo aperos Dio, venkos Neronon, la Antikriston, detruos la grandan urbon per fajro kaj katenos la diablon por mil jaroj. Tiel komenciĝos la miljara regno, ktp. Ĉio ĉi nun perdis ĉian signifon, escepte por naivuloj, kiuj eble daŭre provas elkalkuli la tagon de la lasta juĝo. Sed kiel aŭtenta bildo de la

---

-3 kaj mortis en la jaro 68. Li estis roma imperiestro en la jaro 68. Li regis post la imperiestro Nero, en jaro politike relative nestabila, nomata la „jaro de la kvar imperiestroj”. (Laŭ Vikipedio) -vl

21 La supra skribmaniero de la nomo, kun kaj ankaŭ sen la dua *nun*, kongruas kun la skribmaniero de la Talmudo kaj estas do aŭtenta. (-fe)

## Frederiko Engelso: La libro de revelacioj (La apokalipso)

preskaŭ primitiva kristanismo, pentrita de unu el ĝiaj adeptoj, la libro valoras pli ol ĉiuj ceteraj libroj de la Nova Testamento kune.

# Vikipedio pri apokalipso

## La ĝenro apokalipso

Apokalipso (greke *ἀποκάλυψις*), laŭvorte „senvualigo”, el la greka *κάλυψις* = vualigi, en la kristanismo tradukita kiel „revelacio”), estas teme difinita ĝenro de religia literaturo, kiu metas en la centron la nociojn „dia juĝo”, „mondpereo”, „epokŝanĝo” kaj la „senvualigo de dia scio”. En profete-vizia lingvo apokalipso raportas pri la „katastrofa fino de la historio” kaj pri la veno kaj esto de la „dia regno”.

Pli vastasence ankaŭ sekulara literaturo, ekz-e sciencfikcio, povas havi la trajtojn de apokalipso.

La teologia faktermino por profetaj kaj apokalipsaj estontec-atendoj estas eŝhatologio.

Apokalipsoj ofte reagas al konkretaj historiaj okazaĵoj kaj rilatas al ili. Ili priskribas radikalajn enmondajn ŝanĝojn en metaforoj de mondpereo aŭ interpretas ilin religie, rilatigante ilin al la tempofina „eonŝanĝo” kaj al la dia fina juĝo. Por tio ili uzas metaforan kaj mitan lingvon; historiaj personoj kaj okazaĵoj estas ofte priskribataj kiel simboloj aŭ bildmotivoj – oftege kiel „bestoj”. Ofte aperas anĝeloj kiel revelaciantoj de estonteco aŭ kiel interpretantoj de la estontec-vizioj. Tiel ilia senvualigo estas dense ligita kun la instruo pri anĝeloj (anĝelologio, anĝeliko). Apokalipsoj estas do teologiaj interpretoj de la historio, kiuj provas interpreti la venontan historion el la pasinta kaj la pasintan el la estonta, kaj tiel starigas ampleksan bildon pri la monda evoluo.

## Antikveco

Jam en la antikvaj mitoj pri mondkreado de Asirio kaj Babilonio, ekz-e en la Gilgameŝ-eposo, aperas apokalipsaj imagoj. En la persa zoroastrismo aperas la ideo de fina batalo inter la „bono” kaj la „malbono”, inter „lumo” kaj „mallumo”. De tie ĝi penetris en la helenismon.<sup>1</sup> En la normanda kultursfero la mondpereo estas konata kiel *ragnarok* – „sorto de la dioj”.<sup>2</sup>

---

1 Civilizacio evoluinta ekster Grekujo sub la influo de la greka (dum kaj post la regado de Aleksandro la Granda). -vl

2 En la skandinava mitaro, tago de la lasta juĝo, kiam ĉio devas pere, eĉ la dioj. (Laŭ PIV) -vl

## Judismo

Kiel literatura ĝenro la apokalipso apogeis en la judismo de la *Dua Templo* (539 a.n.e.) ĝis ties detruo (70 d.n.e.). Posta apokalipsa literaturo plej ofte daŭrigis ekzistantajn bibliajn tradiciojn. Striktasence necesas distingi apokalipson en la biblia tradicio disde profetaĵo: La profeto elparolas nome de Dio vorton de admono, de juĝo aŭ de aŭguro en difinita historia situacio al la dia popolo (ekz-e Jes. 7,1-16). Sed la aŭtoro de apokalipso peras helpe de bildeca lingvo dian planon pri la disvolvado de la mondhistorio ĝis la fina juĝo kaj la kreado de nova mondo (ekz-e Danielo 7,1-15). Ĉe tio al la apokalipsanto helpas ekstertera peranto, ekz-e anĝelo aŭ dia voĉo, ĉe la interpretado de la bildoj, kiujn li vidis (ekz-e Danielo 7,16-28).

Atendoj de mondfina tempo aperis jam en la 8-a jarcento a.n.e. en la frua profetaĵo de katastrofo: Amos anoncis en la norda regno de Israelo „tagon de JHWH”, kiu alportos „mallumon, ne lumon” al Israelo (Am 5,18-20). Micha anoncas samon en la suda regno, lige kun fintempa popolmigrado al Ciono, la templomonto en Jerusalemo (Mi 4,2-4). Jeremio 200 jarojn poste reuzas tiun profetaĵon de katastrofo faritan de Micha; lia profetaĵo rilatas al la politikaj okazaĵoj ĝis la unua detruo de la templo kaj al la ekziliĝo de la juduja supera tavolo (586 a.n.e.).

En la ekzila profetaĵo de Israelo, historiaj juĝoj, kiujn fremdaj regantoj plenumas al Israelo, estas ligitaj kun popoljuĝo kaj universaligataj (ekz-e Jes 2, Joel 4). Ankaŭ la atendo de la mesio estas tendence apokalipsa, ĉar la mesio ĉesigas la historion de maljusteco kaj de perforto de la mondo kaj kondukas ĝin al justa fino (Jes 9). Ĉe Jesajo la mesio kiel mondjuĝisto estas jam ligita kun la imago de definitiva transformo de la tuta kosmo inkluzive de la naturleĝoj (Jes 11).

Ĉe la pli posta ekzilprofeto Jeĥezkel (Ezeĥiel) la anonco de la baldaŭa fina juĝo (Jeĥ 7) estas ligita kun vizioj, kiuj reregardas al pasintaj juĝoj kaj „antaŭdiras” tiujn: ne nur la „hororaĵojn” (Jeĥ 8), kiuj altiras la detruon de la unua templo (Jeĥ 9) kaj la pereon de la reĝeco (Jeĥ 19), sed ankaŭ la venkon de Nebukadnezaro super Egiptio (Jeĥ 29-32). Ankoraŭ sen ligo kun tio aperas nun ankaŭ la imago de transa vekado de la mortintoj (vizio de Jeĥezkel, Jeĥ 37).

En la libro Danielo tiuj motivoj densiĝas al la granda vizio pri la alveno

## Frederiko Engelson: La libro de revelacioj (La apokalipso)

de Dio por la fina juĝo (Dan 7), kiu, laŭ ĝi, definitive ŝanĝos la tutan mond-historion: Ĉia perforta regado estos tiam neniigota. La „Homsimilulo” – la origina samulo de Dio – aperos, ricevos la plenan potencon de Dio kaj per ĝi realigos la eternan Di-regadon anoncitan de la profeto. Jam ne estas menciita la mesio nek enhistoria returniĝo de la popoloj al la dio de Israelo; tamen tiu apokalipso konservas la promeson de la pli malnova profetaĵo en la situacio de akuta minaco al la ekzisto de Israelo sub Antioĥo la 4-a.

En la 2-a kaj la 1-a jarcento antaŭ nia erao estiĝas kromaj libroj kun apokalipsa temo, ekz-e la etiopa Henoĥo, la 4-a libro Ezra kaj la „militrul-aĵo” de *Qumran* (proks. 130 a.n.e.) Sed el tiuj, rabena sinodo ĉe *Javne* ĉirkaŭ 100 d.n.e. transprenis nur la libron Danielo kiel aŭtentan daŭrigon de la biblia profetado en la kanonon de la juda Tanaĥo.

## Prakristanismo

La prediko de Jesuo pri la dia regno kaj pri la homfilo estas komplete stampita de la bibliaj profetaĵoj kaj apokalipsoj. Sed la atendo de katastrofo, kiu tie estas ofte ligita kun la mondfino, estas nun, sekve al la Deŭterojesaĵo, pli forte enmetita en la pli larĝan savatendon por ĉiuj, ankaŭ por la perditaj kreitaĵoj aperontaj antaŭ la fina juĝo: ekz-e en la makarismoj de la montprediko (Mt 5,3-10).

